

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Projekto “Nia Unua Lernolibro de la lingvo” — Lastajara rezulto kaj ĉi-jara klopodo —

Kiel ni jam plurfoje skribis, ni kolektas pere de tutmondaj esperantistoj, lernolibrojn de la unuopaj landoj/lingvoj, kaj ekspoziciis/os. En 2016 ni kolektis 28 librojn de 17 personoj. Pri la epizodo de kolektado kaj la karakterizo de la lernolibroj, legu de la venonta paĝo!

Por ekspozicio en ĉi-jara septembro kaj novembro, kiu lasta estas ene de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso, ni ankoraŭ kolektas lernolibrojn. De jenaj landoj jam venis libroj ĉi-jare: Italio / Slovakio / Svedio / Irlando / Francio / Uzbekio / Belgio / Nederlando / Bulgario / Tajlando / Litovio / Kazahio (laŭ la ordo de alveno).  
Legu de la venonta paĝo. ➔

## Aliĝu al la 104-a Japana Esperanto-Kongreso!

**Dato:** la 3a, 4a, 5a de novembro 2017

**Kongresejo:** “Kanagawa Roodoo Plaza”, en la mezo de Jokohamo

**Kongresa temo:** Haveno peras, Esperanto peras.

**Kotizo de homo el eksterlando:** 2 000 enoj

**Kongresaj memoraĵoj:** “Manlibro pri Jokohamo” (kolora gvidlibro pri nia urbo), sendota al paginta aliĝinto, eĉ se tiu efektive ne vojaĝos al nia lando); “Historio de Esperanto-movado en Kanagavo” (japanlingva)

**Por aliĝo,** turnu vin al Japana Esperanto-Instituto (rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: <http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/>)

**Pri la urbo Jokohamo,** turnu vin al ni, je [info@esperanto.yokohama](mailto:info@esperanto.yokohama)

### Ĉefaj programeroj

\*Ptm. de la 3-a de nov.: Post inaŭguro estos i.a. prelegoj pri la kongresa temo, de germano Dieter Kleemann kaj japano Kimura Goro Christoph.

\*Vespere de la 3-a de nov.: estas “Arta Vespere”.

\*4-a de nov., kaj atm. de la 5-a de nov.: Diversaj

fakkunsidoj, organizitaj de JEI, la Kongresa Komitato kaj de unuopaj esperantistoj aŭ grupoj. Prelegoj.

\*Vespere de la 4-a de nov.: Bankedo ĉe proksima ĉin-stila restoracio

\*Ptm. de la 5-a de nov.: Ferma ceremonio, kaj poste, ekiro al postkongresaj ekskursoj kun 1 tranokto: kurso A al Insulo Enoŝima, kurso B por surŝipa vespermanĝo kaj venont-taga ekskurso en la urbo Jokohamo.

\*Tra la tuta kongresa periodo: budoj por vendi esperantaĵojn, ekspozicio de la “Unua Lernolibro”.



## Jokohamo 2017

La 104-a Japana Esperanto-Kongreso

## Pri la ekspozicio de lernolibroj de naciaj lingvoj

Ni skribas sube kiel ni kolektis la lernolibrojn, kaj ankaŭ pripensadon pri la lernolibroj.

Preskaŭ ĉiujn ni petis per interreto. Multaj adresitoj estis niaj konatoj sed estis ankaŭ nekonatoj, kies nomojn ni trovis en la jarlibro de UEA. Ni ne memoras al kiom da esperantistoj ni petis rete, sed povas esti ke ni sendis al ĉ. 100 esperantistoj mesaĝon petante sendi al ni lernolibron de sia gepatra lingvo.

Jen, laŭ la lingvoj

### 1. la korea lingvo:

S-ro Lee Jung-kee, kiu estas nun estrarano de UEA, donis la lernolibron de la korea lingvo, responde al nia peto. Ni ricevis ĝin en la UK en Nitro.

En la lernolibro de la korea lingvo ni vidas nur hangulajn literojn. Kaj la lernolibro montras gvidon kiel teni sin kaj kiel teni skribilon mane dum lernado, same kiel en lernolibro de la japana lingvo. Gravus ankaŭ kiel skribi hangulajn literojn laŭ la ordo. La bildoj en la lernolibro donas bonajn sentojn al lernantoj.



### 2. la ĉina lingvo en Ĉinio:

S-ro Ji Yingeng, konato de Sibayama Noriko kaj Zun'iti (niaj membroj), kaj abonanto de "Novaĵoj Tamtamas" sendis la lernolibron.

De la unua paĝo de la lernolibro aperas ĉinaj ideogramoj. Oni trovas problemon pri ĉinaj literoj, kiujn legi kaj skribi estas malfacile por lernantoj. Tial por legi oni uzas 'pinjinojn' (latinida alfabeto por la transskribo de la ĉinaj ideogramoj laŭ PIV) en Ĉinio. La literoj estas skribitaj horizontale, kaj do la lernolibro estas bindita dekstre. Gravus la ordo de skribado. Oni devas lerni ankaŭ tonon. La bildoj estas malgrandaj ilustraĵoj, kiuj temas pri ĉinaj lernantoj kaj ankaŭ scenoj de la vivo ĉirkaŭ ili. Sur lastaj paĝoj ni trovas la tabelon de ĉinaj literoj, kiujn lernas lernantoj.



### 3,4. la norma ĉina lingvo en Tajvano:

Ni petis helpon de s-ro Reza Kheir-kah, irana esperantisto nun loĝanta en Tajvano. Sibayama Zyun'iti petis lin sendi lernolibron. Reza Kheir-kah transpetis tion al instruistino proksime loĝanta. La lernolibro estis sendita poŝte.

Estas pli malfacile lerni normajn ĉinajn ideogramojn, kiujn ĉinoj uzis antaŭe. Tie por lerni prononcon de la literoj oni uzas bopomofon (silabaro indiki prononcon de la normaj ĉinaj literoj). La bildoj sur 1-2 paĝoj etendiĝas tutpaĝe. Ili montras amuzajn scenojn por lernantoj. Oni instruas ankaŭ ordon de skribmaniero.



### 5. la mongola lingvo:

Murata Kazuyo (nia membro) petis sian konaton, s-inon Altanceceg. La lernolibro estis sendita rekte al Murata, kaj poste al la aranĝantoj de la ekspozicio.

En Mongolio oni uzas kirilajn literojn. En la lernolibro troviĝas ilustraĵoj de aspekto pri ĉiutaga vivo en Mongolio. Lernantoj lernas pri sintenado de lernado. De p.31 lernantoj lernas kirilajn literojn iom post iom, kaj de p.127 ili uzas ĉiujn kirilajn literojn.



### 6,7. la vjetnama lingvo:

Doi Ĉieko petis s-inon Nguyen Thi Phoung Mai, kiu en 1999 vizitis Japanion okaze de la Japana Kongreso en Moĉizuki en la gubernio Nagano, kaj poste restis ĉe Doi dum iom da tagoj. La lernolibron ni ricevis en Nitro, okaze de la UK.

La lernolibro estas por lernantoj de la komenca parto de la unua lernoĵaro. Ĝi enhavas 83 lecionojn kaj lernantoj lernas tonojn, latinajn literojn kaj supersegmentaĵojn. Lernantoj unue lernas vjetnaman alfabeton; due ili lernas kiel legi kaj skribi la literojn; trie ili lernas kiel teni sin dum legado kaj skribado; kvare ili ekzercas sin pri interparolado; kvine ili rigardas bildojn de soldatoj kaj sese ili nur legas.




### 8. la bengala lingvo:

D-ro Probal Daŝgupta, eksa prezidanto de UEA, sendis la lernolibron. Li estas profesoro pri lingvistiko en Hindio (Barato) kaj do li petis de siaj studentoj havi la lernolibron de la bengala lingvo. La lernolibro estis tuj enmanigita, sed pro troa varmeĉo la studento ne povis eliri eksteren. Do la lernolibro estis iom malfrue sendita post mildiĝo de la klimato.

La bengala lingvo estas oficiala lingvo de Bangladeŝo kaj de unu el 22 lingvoj asignitaj en la konstitucio de Hindio.

La lernolibro estas por lernantoj, kiuj lernas nur bazajn literojn. La frazojn oni legas de maldekstro al dekstro. Kiam oni unuigas du partojn al unu vorto, oni ligas ilin per supra streketo. Sur ĉiuj paĝoj troviĝas rakonto kun gravuraĵo monokromata. Ciferoj estas diferencaj de ĉinaj, aŭ latinaj, aŭ arabaj.



### 9. la taĝika lingvo:

Doi Ĉieko petis s-ron Firdaus Ŝukurov, kiu en 1995 vizitis Japanion kaj restis ĉe Doi. Lia nevino vizitis Jokohamon en 2013 post la 100a Japana Kongreso en Tokio. La lernolibro estis sendita poŝte.

Sur la dorsa flanko de la kovrilo troviĝas tabelo de kirila alfabeto. Sur p.2 estas parolado de la prezidento, sekvas la naciaj standardo, blazono, la fondinto de Taĝikio en la 10a jarcento, monumento kaj portretoj de ses herooj de Taĝikio. Sur p.25 troviĝas instruoj kiel skribi pres- kaj kursiv-literojn. En la lernolibro troviĝas ilustraĵoj de bestoj, plantoj, montoj kaj herbejoj, sed ne troviĝas ilustraĵo de maro. Ja, maro ne troviĝas en la lando!



### 10,11. la germana lingvo:

Doi Ĉieko petis ges-rojn Dieter kaj Yoshie Kleemann, kiuj vizitas Japanion preskaŭ ĉiujare kaj ofte restis ĉe Doi. Pri la lernolibro: unu libro estis sendita poŝte, kaj la alia estis ricevita en Nitro.


Ĉi tie ni prezentu la unuan libron. Unue lernantoj lernas kiel skribi pres- kaj kursiv-literojn, kaj poste ili ekzerciĝas pri skribado kiel lude.

La lernolibroj estas pruntedonitaj kaj kiam finiĝis la lernado oni redonas la librojn. Sur p.126 infanoj legas poemon kaj respondas al demandoj.



### 12. la rusa lingvo

S-ino Elena Nadikova, kiu loĝas en Ĉuvaŝio, unu el respublikoj en Rusio, sendis du lernolibrojn de la rusa kaj de la ĉuvaŝa, ricevinte nian retan mesaĝon. Ni tute ne konis ŝin antaŭe. Ni trovis ŝian retadreson en Jarlibro de UEA. Leginte la mesaĝon, ŝi opiniis, ke tio estas tre valora laboro, kaj sendis al ni ambaŭ-lingvajn lernolibrojn. Ĝis tiam ni ne sciis, kie estas Ĉuvaŝio. Ĝi ja estas 700 km oriente de







Moskvo.

Pri la rusa lingvo: Oni uzas kirilajn literojn. Unue lernantoj lernas facilan konversacion. Poste rigardante ilustraĵojn ili lernas facilajn vortojn kaj poste komencas lerni literojn. De la 15a leciono aperas literoj kaj poste lernantoj lernas skribi literojn. Laŭ la literoj lernitaj aperas vortoj multaj unu post la alia.

**13. la ĉuvaŝa lingvo:**

Sendinto estas sama de n-ro 12.


Pri la ĉuvaŝa lingvo: En Ĉuvaŝio (en la Rusa Respubliko) oni eklernas devige ambaŭ lingvojn en la unua lernoĵaro: la rusan kaj ĉuvaŝan. Lernantoj lernas la lingvon kiel lude.



**14. la rumana lingvo:**

La sendinto, s-ino Alexandrina Moise, vizitis Japanion, okaze de la 92a Japana Kongreso en 2005, kiu okazis en Jokohamo. Ŝi estis invitita de nia rondo, ĉar ŝia loĝurbo, Konstanco en Rumanio, estas ĝemela urbo de Jokohamo. Eksciinte nian peton en “Novaĵoj Tamtamas”, ŝi sendis la lernolibron per poŝto.

La lernolibro komenciĝas per legmaniero de alfabeto. Ĉiuj paĝoj krom la kovrilo estas monokromataj. Unue lernantoj lernas literojn kiel legi kaj poste ili lernas legaĵojn.



**15,16. la kroata lingvo:**

S-ro Josip Pleadin iel eksciis nian ekspozicion kaj miris, ke ankaŭ li planas preskaŭ saman ekspozicion en ĉi tiu jaro 2017. Ni promesis kunlabori. En la UK en Nitro ni donis al li japanlingvan lernolibron kaj ricevis de li lernolibrojn de la kroata lingvo. Post la UK en Nitro li sendis mesaĝon, ke li jam kolektis ĉ.100 lernolibrojn. Mirinda afero!



Per la lernolibroj lernantoj lernas kiel legi kaj skribi presliterojn, kaj komparante presliterojn ili lernas ankaŭ kursivajn literojn. Ili lernas ankaŭ facilajn legaĵojn.



**17,18,19,20. la ĉeĥa lingvo:**

S-ro Petr Chrdle, kiu estas tre fervora kaj energia esperantisto kaj estras sian eldonejon Kava Pech, sendis 4 lernolibrojn de la ĉeĥa lingvo.

Lernantoj lernas kiel legi kaj kiel skribi literojn en pres- kaj kursiv-literoj.



**21,22. la slovaka lingvo:**


S-inon Jana Rambousková vizitis ges-roj Sibayama Noriko kaj Zyun'iti post la UK en Nitro. Ŝi estas korespondantino de Sibayama Noriko. Vizitinte ŝin la gesinjoroj ricevis ekzerc-kajerojn por skribi pres-kaj kursiv-literojn. La oficialaj lernolibroj jam ne estis akireblaj en aŭgusto.



**23. la svahila lingvo:**

Sendis la lernolibron de la svahila lingvo s-ro Joel Muhire en Konga Demokratia Respubliko; antaŭe la lando estis nomita kiel Zairo. En Konga Demokratia Respubliko oni instruas la francan kaj la svahilan lingvojn. Sed, ĉar la lernolibro estas tre valora, li sendis kopion de la lernolibro de la svahila lingvo.

Unue lernantoj lernas vokalojn kaj poste konsonantojn. Ili lernas kombinaĵojn de vokaloj kaj konsonantoj. Ili lernas ankaŭ kiel manskribi kursivajn literojn.



**24. la hispana lingvo en Meksiko:**

S-ino Mallely Martínez en Meksiko kunlaboris. Ni tute ne konis ŝin antaŭe. Ŝi estis unu el ĉ. 100 adresitoj de pet-mesaĝo. Antaŭ la UK en Nitro ŝi sendis mesaĝon al ni kaj promesis kunporti lernolibron de la hispana lingvo en Meksiko. Kaj unuafoje ni renkontiĝis en la kongresejo.

Lernantoj ricevas lernolibrojn senpage. Ili lernas unue literojn por vokaloj kaj poste por konsonantoj. La tuta alfabeto troviĝas en la fino de la lernolibro. En la lernolibro troviĝas enigmoj per krucvortoj kaj ankaŭ ludoj.



**25,26,27. la hispana lingvo en Ĉilio:**

Kunlaboris s-ro José Antonio Vergara en Ĉilio, eksa estrarano de UEA. En la UK en Nitro ni ricevis la lernolibron de la hispana lingvo en Ĉilio. Anticipe per interreto li sendis ankaŭ PDF de malnova lernolibro de la hispana, eldonita tuj post la Dua Mondmilito, kaj ankaŭ PDF de kovriloj de malnovaj lernolibroj eldonitaj en la 19a jarcento.


Per la lernolibro lernantoj lernas skribi literojn voĉlegante kaj poste lernas skribi kursivajn literojn. Ili lernas frazojn en letero kaj ankaŭ enigmojn.



**28. la angla lingvo en Aŭstralio:**

S-ro Trevor Steele en Aŭstralio sendis ne lernolibron, sed legolibron de la angla lingvo kun aŭstralia prononco. Li estis ĝenerala direktoro de UEA en 2002-2004. Li estis la homo, kiu unuavice sendis mesaĝon al nia laboro: t.e. ni sendis Esperantan version de la deklaro libera de la nukleaj armiloj en la gubernio Kanagawa, al ĉ. 1500 delegitoj de UEA. La laboron ni faris en 1984. En 2003 li vizitis ankaŭ Jokohamon por esplori la aferojn de la UK en Jokohamo. Menciindas, ke li estas fama verkanto en Esperanto. Li verkis multajn fikciajn-nefikciajn originalajn romanojn kaj novelojn en Esperanto.

La sendita libro estas ne lernolibro sed facila legaĵo. S-ro Steele aldonis kiel legi la frazojn laŭ aŭstralia maniero. Tio estas tre interesa.





**Postparolo**

Estis tre bedaŭrinde ke ni ne povis ricevi lernolibrojn de Nepalo, Albanio kaj Ebur-bordo. Kvankam esperantistoj en tiuj landoj sendis al ni sialandan lernolibron, ili perdiĝis survoje. Mi devus skribi, ke oni sendu lernolibrojn registrite.

Post la ekspozicio lastjare ni ricevis lernolibron de la itala lingvo, pere de Glauco Pompilio, nia membro. Ni intencas kolekti ankoraŭ pli multajn lernolibrojn.

Mi volas diri nun ke similajn ekspoziciojn faris s-ro Matuba Kikunobu, tre fama esperantisto en Jokosuka, sude de Jokohamo, sed li jam forpasis en 1989. Estas mirinde ke li kolektis ĉ. 100 lernolibrojn el 25 landoj en la tempo, kiam ne funkciis interreto.

Ni do devas pli energie kolekti kaj fari pli ampleksan ekspozicion. Estas strange, ke inter niaj kolektaĵoj ne estas lernolibroj de la angla escepte de tiu en Aŭstralio, kaj mankas ankaŭ la franca. Mankas ankaŭ lernolibroj en multaj aziaj landoj.

Bonvolu kunlabori kun ni por kolekti pli multe kaj aranĝi pli bone kaj efike la ekspoziciojn ĉi-jare.  
Fuse Kentarou kaj Doi Ĉieko

**Tiel Okazis****Kunloĝado en Esperanto-Domo de Jacugatake**

\*maj. 13 - maj. 14: 11 membroj aliĝis kaj 10 el ili tranoktis.

Tiu domo estas staĝejo de Japana Esperanto-Instituto, en monta distrikto, 200 km de Jokohamo, por maksimume 15 personoj por tranoktado.

Du el la klasoj, nome "Eseoj" kaj "Salono" havis tie posttagmeze sian kutiman lernoprogramon, kaj post vespermanĝo ni havis specialan "Hama-Rondan Vesperon" tie, kun diversaj paroloj en Esperanto, kaj ankaŭ okazis piano-ludo kaj kantado. La sekvantan tagon, oni libere pasigis la tempon – nome iuj ekskursis ĉirkaŭe, iuj rapidis hejmen jam frue, ktp.



foto liverita de s-ro Doi Hirokaz

**Niaj Planoj**

\*Movada Foiro en la Seula UK (22a de julio)

Okaze de la Movada Foiro, montrejo de diversaj organizoj, okaze de la 102-a Universala Kongreso en Seulo, Koreio, nia rondo havos tablon, kaj reklamos i.a. pri nia Japana Kongreso.

\*Ekspozicio pri Esperanto, kun "la lernolibroj de sia nacia lingvo"

En la kutima kunvenejo, de la 11a ĝis la 13a de septembro, ni okazigos la ekspozicion. La ekspozicio denove okazos kadre de la novembra Japana Esperanto-Kongreso.

**Niaj klasoj kaj kursoj**

Okazas jenaj klasoj

(ĝenerale en Kanagaŭa Kenmin Sentaa)

\*Regulaj Klasoj en sabato:

- (1) Klaso "Eseoj" por legi "Tamen ĝi moviĝas!"
- (2) "Jokohama Salono": 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

\*Regulaj Klasoj en merkredo:

- (1) Posttagmeza klaso "eriko" por legi "La Zamenhof-Strato" gvidata de Doi Ĉieko
- (2) Antaŭtagmeza klaso "Belĉielo" por legi "Punkuino", gvidata de Doi Ĉieko

\*Krome neregule du fojojn monate, la Klaso "Belflora" por legi libron "La Orpantalono", gvidata de Doi Ĉieko